



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 286

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au Fonds Normand de la Médiathèque de Caen,
aux Archives du Calvados
et à la Bibliothèque de Cherbourg.

Majo 2023

Enpaĝigas : Michèle Langeois

Korektas Dominik Cornice

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



**Le 17 juin 2023, tous-toutes à
Dives sur Mer pour notre
journée touristique et
coïncidence, le beffroi sera
inauguré ce même jour !**

La commune de Dives-sur-Mer possède un patrimoine exceptionnel avec son église, ses halles, son manoir du Bois Hibou, son village Guillaume le Conquérant, sa Maison Bleue et son **beffroi**. Longtemps laissé en friche, celui-ci **sera inauguré le 17 juin 2023**, après plusieurs mois de travaux qui lui ont rendu son aspect d'origine. Il se dresse à nouveau fièrement face à la ville.

Suite page 11.



**ĈIUJ
ĉe Dives-sur-Mer
la 17 an de Junio !**

Kiel editori?

Kiel multe da nuntempuloj, mi serĉas rete kiam mi bezonas manieronfari kaj mi legas ke pluraj eblecoj ofertiĝas.

Unua propono:

En Hérouville, normandaj esperantistoj retrovis sin en plezuriga etoso por omaĝe al Yves aŭskulti talentajn muzikistojn.

Ni same partoprenos, por la plezuro, la venontan viziton al Dives-sur-Mer kaj lernos pli pri tiu historia urbeto kiu ekde la 10-a ĝis la 20-a jarcento famiĝis.

Jes ja, ni kune daŭrigos viviĝi nian asocion, el la pasinteco ĝoje kreu ni estontecon!

Ĉu vi pretas?

Je via emo, por nutri nian estonton, sendu proponojn pri vizito de indaj lokoj, artikolojn, fotojn...

Ĉu kiel mi, vi legas recepton kaj adaptas ĝin, laŭ viaj emoj, viaj spertoj, via plezuro... kaj fine laŭ la enhavo de la kuireja ŝranko?

Veronik'Girard
Prezidantino

ENHAVO-SOMMAIRE

P. 2 : C.A extraordinaire, adhésion, Le Havre en espéranto

P. 3: recepto, la roko de diablo, divenaĵoj

P. 4: renkonto en Bjalystoko, fungoj (parto 3)

P. 5: fungoj

P. 6: M.E.S "les Issambres",

P. 6 et 7: Omaĝe al Yves, en Hérouville, la 24an de marto

P.8 et 9: renkontiĝo en Parmo

P.10: Mikaelo Bronstein vizitis la klubon Hérouville-Espéranto, kongreso de SAT en Greziljono

P.11 et 12: turisma tago en Dives-sur-Mer la 17 an de junio

C.A extraordinaire de l'ASSOCIATION NORMANDE d' ESPÉRANTO– réunion du 18 février 2023 – Maison des Associations – Hérouville Saint-Clair.

Dum kunvevo, la 18an de februaro 2023, agentoj de la normanda asocio klare diris ke ili deziras ke tiu asocio plu vivu, proponoj pri la estonto estis faritaj.

Kunvenis Sylvie Caron, Patrice Dufeu el la Havra Esperantista Grupo, Gigi Sénécal, Michèle Langeois, Gérard Sénécal, Bertrand Verstraete, Jean-Pierre Sauvage el la grupo Hérouville Espéranto, Anne-Marie Leprévost esperantista grupo el Flers (Système d'Échanges Local : échanges de savoirs), Véronique Girard (Villers-sur-Mer), Elisabeth Mérel (Granville).
Ekskuzite : Christian Lévesque (Granville).

Ni ne ricevis respondojn al la kunvenpropono el Matthieu Lecesne - Rouen, Pascal Hébert - L'Aigle.

Post revizio de la listo de la ricevontoj, plu aperos la «NORMANDA ESPERANTO BULTENO», maje, septembre, kaj januare. Plu relegas Dominique Cornice, plu enpaĝigas Michèle Langeois, ili estu dankataj pri tiu grava laboro.

La turisma tago okazos la 17an de junio 2023, en Dives-sur-Mer, la programo jam indikita en la normanda Bulteno n° 2841 je la dato septembro 2022 plu validas.

Normanda asocio

Prezidantino : Véronique Girard, vicprezidanto Jean-Pierre Sauvage, kasistino Sylvie Caron, Elisabeth Mérel proponas sin kiel vickasistino, sekretariino Anne-Marie Leprévost.

Departementaj delegitoj :

14 : Véronique Girard, Jean-Pierre Sauvage

27 : Barthélémy Maurau

50 : Elisabeth Mérel, Christian Lévesque

61 : Anne-Marie Leprévost, Pascal Hébert

76 : Sylvie Caron, Patrice Dufeu, Matthieu Lecesne

Véronique Girard (14)



Véronique



Jean-Pierre



Sylvie



Élisabeth



Anne-Marie



Patrice

Kotizoj

Mi dankas samideanojn por la deko da realiĝoj jam senditaj.

Por la bonfarto de la kontoj, pensu same agi kun ĉeko sendota al Sylvie sed je "Espéranto Normandie" alskribota.

Antaŭdankon. **Sylvie**

Pensez (Si ce n' est déjà fait) à régler votre cotisation pour l' année 2023 (10€)

Vous pourrez le faire lors de la journée touristique du 17 juin ou envoyez votre chèque à l' ordre de "Espéranto Normandie" à Sylvie Caron, 44 rue Georges Lannier. 76600 Le Havre
Merci.

Bonvenon en Havro :

Se okaze vi ŝatus partopreni esperantolingvan kaj turisman sperton norde de Sejno, sendu peton al greeters- lehavre.com

Pli da informoj alklakante "renkontu niajn bonvenigantojn", elektu kaj rezervu.

La promenadproponoj estas sugestoj, ni interkonsentos laŭ via deziro.

Kun Sylvie estu bonvena!



En la venonta bulteno, esperante historio de Havro, skribita de Sylvie.



La recepto de Brigitte Legoma kaj fromaĝa supo

Ingrediencoj :

700 gramoj da endivioj
400 gramoj da lakto (40 cl)
60 gramoj da faruno
200 gramoj da akvo
50 gramoj da fromaĝo
(tipo Boursin)
20 gramoj da butero
2 pinĉetoj da manĝebla
bikarbonato
1 kubo da kokido
1 pinĉeto da muelita
muskato, pipro, salo

Kuiriloj :

Tranĉilo
Premmarmito
Elektra miksilo

Preparado :

Senŝeligu la endiviojn, haku ilin.
Prenu la premmarmiton, verŝu la
hakitajn endiviojn, aldonu la kokan
kubon, la akvon, la muskaton, la
manĝeblan bikarbonaton, salon,
pipron. Kuiru dum dek ok minutoj.
Post kuirado, aldonu lakton, farunon,
fromaĝon.
Kuiru denove dum kvin
minutoj, poste miksu per elektra
miksilo dum unu minuto.

Verŝu la supon en la bovlon
kaj **gustumu**.

Brigitte Cottin (14)



LA ROKO DE DIABLO

Same kiel en multaj regionoj, ekzistas fabeloj kaj legendoj en Alta Morjeno (Haute Maurienne). Gigi kaj mi plurfoje aŭdis kelkajn el tiuj fabeloj kaj legendoj dum vintraj prezentadoj fare de loka rakontisto, loĝanto de nia montara vilaĝo Lanslevillard.

Sed la ĉi-suban legendon ni neniam aŭskultis. Ni legis ĝin dum unu el niaj someraj ekskursoj, sur panelo proksime de grandega roko, super la vilaĝo Aussois.

La loĝantoj de la vilaĝo Aussois estante tre piai, la Diablo malesperis. Remaĉante sinistrajn pensojn koncerne tiujn ulojn, naskiĝis ideo por definitive sin liberigi de ili : detruu la preĝejon la sekvantan dimanĉon, sciante ke la tuta loĝantaro ĉeestus tie je la diserva horo.

Por bone sukcesigi sian fatalan projekton, li lokalizis ĉe la monto Fournache grandegan rondan rokon. Li antaŭvidis ruliĝi ĝin laŭ la deklivo en la vilaĝakso por detruu la preĝejon kaj premmortigi ĉiujn ĉeestantojn.

Malbona ideo !

Ĉar kiam li sin preparis por efektiviĝi sian krimigon, kvar grandaj leporoj ekaperis, levis la ŝtonegon kaj lasis ĝin refali surloken, premmortigante la Diablon !

Sur la panelo sur kiu legeblas la legendo, mallonga informo antaŭavertas la scivolemajn turistojn :

Ne provu ŝoviĝi sub la rokon eĉ ventrokuŝe, vi

povus fari malbonan renkontiĝon !
(Eble indas precizigi, ke tiu roko estas pli alta ol du viroj kiel mi kaj pezas verŝajne plurajn tunojn.)

Gérard SÉNÉCAL (14)



 **En la venonta bulteno artikolo pri la libro de Anna Löwenstein "La memoraĵoj de Julia Agripina"**

Kio estas la diferenco inter ventomontrilo kaj horloĝisto?


La ventomontrilo montras la ventojn kaj la horloĝisto vendas la poŝhorloĝojn.

(Nur por franclingvanoj)

Kio estas la diferenco inter pioĉo, pulovero kaj semajno?

La pioĉo havas unu manikon, la pulovero havas du manikojn kaj la semajno havas dekmanikojn.

Christian Lévesque(50)



Ĝenerala rimarko: en esperanto same kiel en la plej multaj lingvoj

(escepte de la franca!)

Ne estas spaceto antaŭ

! ? ; :

Dominik

RENCONTRE à Bialystok RENKONTO en Bjalistoko

Le contact ayant été établi par Yves, j'ai pris rendez-vous avec Psemek peu après notre arrivée à Bialystok.

Yves farinte la unuan kontakton, mi interkonsentis rendevuon kun Psemek iom post nia alveno en Bjalistoko.

J'avais alors proposé de nous retrouver dans le centre-ville où se trouve une place pleine de bars et restaurants très prisés des jeunes comme des moins jeunes. Psemek a suggéré de nous retrouver plutôt au local de leur association qui s'y trouve à 2 pas : Esperanto klubejo, au n°3 de la rue Piekna.

Mi tiam proponis renkontiĝi en la urbocentro kie staras placo kun multaj trinkejoj kaj restoracioj ege ŝatataj de homoj junaj kaj malpli junaj. Psemek sugestis rendevui prefereble en la sidejo de sia asocio je kelkaj paŝoj: Esperanto Klubejo, n° 3a en la strato Piekna.



Maldekstre : Xavier, dekstre : Psemek

À l'heure dite, le 23 août, nous sommes arrivés et avons fait la connaissance de Psemek. Il nous a fait les honneurs du local qui se trouve au ½ sous-sol d'un bel immeuble devant une cour commune très végétalisée et soignée.

Je lui ai remis les cadeaux que m'avait confiés Yves.

Akurate alveninte, la 23an de aŭgusto, ni konatiĝis kun Psemek. Li honoris nin per vizito de la klubejo ĉe la ½ (duona) etaĝo sub la ternivelo el bela domo antaŭ komuna korto atente flegata per multaj kreskaĵoj. Mi tiam transdonis la donacaĵojn de Yves.

Nous avons été épatés par le professionnalisme qui règne au sein de ce club d'Espéranto que Psemek nous a fait découvrir, et en particulier par les publications qu'ils mettent en œuvre. On y sentait une vitalité et un réel dynamisme.

Ni ege miris pro la profesia etoso videbla en tiu Esperanta klubo malkovrita dank'al Psemek kaj precipe pro la eldonaĵoj tie produktataj. Senteblas tie vera kaj vigla dinamiko.

Après avoir immortalisé ce moment avec une photo prise devant un cadre de Ludwik Zamenhof, nous avons quitté le local. Comme nous étions à la recherche d'un dictionnaire Français / Polonais, Psemek nous a accompagné jusqu'à une librairie spécialisée en langues étrangères établie dans le quartier.

Post pormemora foto antaŭ la portreto de Zamenhof, ni forlasis la sidejon. Ĉar ni bezonis francan-polan vortaron, Psemek akompanis nin ĝis apuda librovendejo kun fako pri fremdaj lingvoj.

Nous nous sommes séparés alors, lui retournant vers son club et nous pour fouiner dans la librairie. C'était une belle rencontre.

Tiam, ni disiĝis, Psemek reirante al la klubejo kaj ni por trafolumi en la librovendejo. Jen bela renkonto!

Xavier Comby-voisin apiculteur de Yves dont le fils habite à Bialystok.

Yves Nicolas tradukis.

Fungoj Parto 3

Finiĝas vintro, sekve, videblas pliaj sunaj tagoj, plimildiĝas la vetero.

Fungoj baldaŭ kreskigos siajn fruktecajn formojn kiujn multaj homoj ŝatas pluki celante bongustan paton reveninte al sia hejmo.

Ve, ne ĉiuj fungoj estas manĝeblaj, plie, pluraj estas venenaj (toksaj eĉ mortigaj)
Ege grava do estas la sekva demando :

Ĉu manĝi aŭ ne manĝi ? (Tiel staras la demando)

Tiu artikolo, ne celas indiki trukojn aŭ metodojn por distingi manĝeblajn, kaj venenajn fungojn.

Tio ne eblas. La unusola bona sinteno estas jena : neniam pluku fungon sen scii sen ia ajn dubo, kiu ĝi estas. Tiucele, ĉiam pridemandu spertulon pri via rikolto.

Nu, mi prezentos al vi kelkajn ekzemplojn, de ambaŭ kategorioj.

Vidalvide estos manĝeblaj kaj similaspektaj nemanĝeblaj fungoj



Nobla boleto (*Boletus edulis*)
Eble la plej bongusta boleto
(fungo kun tuboj)
Ne troigu la manĝadon !



Amara boleto (*tylopilusfelleus*)
Eĉ peceto de tiu boleto ruinigos
la pladon.
Ne mortiga, sed tute
nemanĝebla pro ĝia amarega
gusto



**Supa agariko (*Kuehneromyces
mutabilis*)**
Sufiĉe bongusta por la supo !



**Margenata folioto (*Galerina
marginata*)**
Mortiga ! Kiel la supa agariko,
kreskas en tufoj, ĝia veneno
similas tiun de *Faloida amanito*.



Verda rusulo (*Russula virescens*)
Bongusta rusulo, neniŭ ringo aŭ
volvo sur la piedo.



**Faloida amanito (*Amanita
phalloïdes*)**
Unu el la plej danĝeraj mortigaj
fungoj, detruas la hepaton,



**Herbeja agariko (*Agaricus
campestis*)**
tre komuna en herbejoj, parenco
de la Pariza fungo
(*agaricus bisporus*)



**Printempa amanito (*Amanita
verna*)**
Samkiel danĝera kiel la faloida
amanito, mortiga



Cezara amanito
Laŭdire, la plej bongusta fungo, nur
trovebla en la sudo de Francio
(domaĝe por ni Normandianoj)



Muŝa amanito
Tre toksa sed ne mortiga (tamen ne
provu gustumi ĝin,
danĝera por la nerva sistemo)

Kiel vi povas vidi, se unu el la plukitaj fungoj estus malbone identigita, la konsekvencoj povus esti katastrofaj.
Nepre havu vian rikolton kontrolita de fakulo (fungologo, farmaciisto) antaŭ ol kuirigi ĝin.
Se mi povus doni lastan konsilon, lernu pri la fungoj ene de fungista asocio, ties membroj bonvenigos vin kaj vi malkovros la fascinan mondon de fungoj

Rémi Troisgros (50)

La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

25.2.2023 - 4.3.2023

MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo Val d'Esguière, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "Village Club Miléade". La hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj)...

Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveloj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de

Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.....

Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Frejus sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Specialan dankon ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

Eltiraĵoj de la raporto de **Liba Gabalda** transsendita de **Anne-Marie Leprévost (61)** kiu partoprenis en la renkonto.



Omaĝe al Yves, en Hérrouville, la 24an de marto 2023.

En la kafejo blovis vespera venteto* dum ekstere tempesto kaj pluvego forĵetis branĉetojn sur la vojojn. Dum ni aŭskultis tiujn muzikistojn ne eblis diveni la eksteran etoson. Varme ni kunkantis kantojn pri malfeliĉaj amspertoj pere de gajaj muzikoj. La tri muzikistoj sperte kure ludis kontrabase, banĝe kaj drumade. Jes, ja kompletiĝas harmonie kaj venigas nin al varmaj landoj. Esperantistoj kaj ne esperantistoj same ĝuis klarigojn pri esperanto kaj pri miksitaj

lingvoj. Armel diras « Esperanto : la plej kreoligata lingvo el ĉiuj kreolaj lingvoj » ĉu tiu vidpunkto ŝokas vin ?

Ni plezure partoprenis la vesperon antaŭviditan de Yves, kaj varme dankas la organizantojn kaj la muzikistojn.

Veronik Girard (Villers sur Mer)

*"La vespera vento" (tekstoj kaj muziko: Armel Amiot)

KONCERTO en Hérouville -Saint-Clair "BANĜO ESPERANTO"



Nia amiko Yves Nicolas forlasis nin la 25-an de oktobro 2022. Antaŭ sia malsano, li komencis korespondi kun muzikisto-banĝisto-kantisto-komponisto el Cherbourg kiu eklernis esperanton dum la unua izoliĝo. La projekto de Yves esti inviti tiun muzikiston, Armel Amiot, veni al

Hérouville prezenti siajn kantojn en esperanto.

Bedaŭrinde la antaŭeniro de la malsano ne permesis al Yves daŭrigi la interŝanĝon. Sed la membroj de Hérouville Espéranto reprenis la torĉon. Por nia amiko, ni estis devigitaj konkretigi la projekton. Tion ni faris.

Dank' al la komprenemo de Armel, dank' al la malavareco de kelkaj donacintoj, kun granda plezuro ni finaranĝis la programon.

La koncerto « Banĝo Esperanto » estis escepta evento pro du kialoj. Unue ĉar nia asocio havas neniun alvokiĝon por organizi tiajn okazaĵojn. Due, kaj ĉefe, ĝi volis esti omaĝo al nia kara malaperinta amiko.

Vendredon, la 24-an de marto, Armel Amiot kaj liaj akompanantoj, la kontrabasisto Pierre Jacquet kaj la drumisto Denis Lainé, regalis la aŭskultantaron. Ne malpli ol sepdek personoj ĉeestis, plenplenigante la Café des Arts, kiu konsentis akcepti la eventon. Pli ol duono de la publiko ne parolis esperanton.

Mallonga parolado de Gérard Sénécal klarigis kial Hérouville Espéranto organizis tiun koncerton kaj Anne-Marie, vidvino de Yves, aldonis kelkajn vortojn por danki la tri muzikistojn kaj la esperantan asocion.

Inter la dek kvin kantoj aŭskultitaj, ok estas originalaj kompozicioj, en esperanto, de la banĝisto Armel Amiot. Estro de la triopo, Armel tre simple kaj tre lerte alparolis la publikon, klarigante kial kaj kiamaniere esperanto inspiris novan direkton al sia repertuaro. La kantoj estis tre ĝojaj kaj Armel sukcesis partoprenigi la aŭskultantaron per ritmaj manfrapadoj. Li eĉ sukcesis, brave al li, kantigi kelkajn simplajn frazojn al neesperantistoj!

Varmkorajn aplaŭdojn la tri muzikistoj ricevis, tiom longe ke ili denove kantis « La vespera vento » helpe de manfrapoj kaj esperantaj vortoj kiujn rekantis la publiko:

la vespera vento ... vespera vento ...
vespera vento ... vespera vento pli kaj pli
mallaŭte ĝis la fino kaj
longaj aplaŭdoj denove.

« Tiu ĉi emociplena vespero estis belega! Dankon! » diris Anne-Marie kaj la familio de Yves.

Hérouville-Saint-Clair Ouest - France 27/03/23
Armel Amiot et ses complices ont fait salle comble



Armel Amiot a chanté des chansons en Espéranto et en Créole. * PHOTO : OUEST-FRANCE

L'invitation de l'association Hérouville Espéranto à Armel Amiot, musicien, espérantiste, fut un franc succès. Salle comble au Café des arts où avait lieu, vendredi, ce dîner concert gratuit.

Gérard Sénécal, président d'Hérouville Espéranto, a souligné l'importance de cette soirée : « Ce rendez-vous est, à l'origine, une initiative de notre ami espérantiste Yves Nicolas, hélas décédé depuis. Nous avons tenu à faire aboutir ce projet en hommage à notre compagnon de longue date, fondateur du club d'espéranto

d'Hérouville. »

Dans la salle, espérantistes et beaucoup d'autres sont venus écouter, autour d'un verre, l'auteur, chanteur et banjoïste cherbourgeois accompagné de Pierre Jacquet, à la contrebasse et Denis Lainé, à la batterie.

L'occasion d'un voyage de la Nouvelle-Orléans à la Guyane, passant par les Antilles, alternant jazz, blues, country et musique créole, avec des textes écrits aussi bien en espéranto, en anglais, en français et même en espagnol.

Contact : armelamiot.com



<http://www.armelamio>



Renkontiĝo inter ĝemelaj urboj.

Ĝuste antaŭ unu monato estis niaj gastoj Veronik', Bertrand kaj Christian. Ni renkontiĝis ĉe la stacidomo de Parma iom post la dekunua horo. Christian estis la unua alveninto kaj aperis kun sia biciklo. Poste elbusiĝis ankaŭ la gesinjoroj Verstraete kaj ili aspektis tre lacaj. Bonŝance nia samideano Andrea Maestri veturigis nin al nia domo en strato Prampolini. Do, post tiom longa vojaĝo povi eniri amikan loĝejon kaj lavi siajn manojn estis ja plezuro. Nia domo estas modesta kaj mi invitis la gastojn senti sin hejme ĉe ni.

Mi surtabligis pastaĵon kaj freŝan salaton el nia legomĝardeno kaj la ĝentilaj gastoj diris al mi, ke ili aprecio ĉion. Kompreneble ne mankis itala vino kaj taso da bona itala kafo.

Tiun tagon ni havis kun ni ankoraŭ mian filinon Alessandra. La postan tagon ŝi devis ekveturi al Milano kaj poste al Ĉinio, kie ŝi nun instruas. Ni sukcesis fari kune kelkajn fotojn sur la balkono.

Mi donis al la ĝentilaj gastoj mapon de la urbo kaj liston de la ĉefaj vidindaĵoj en kaj ekster la urbo. Mi devas agnoski, ke miaj gastoj tre rapide lernis kiel moviĝi pere de la publikaj transportservoj. Nia strato Prampolini estas atingebla per la aŭtobusoj numero 1 kaj 7 kaj ankaŭ Veronik' kaj Bertrand tute senprobleme ekuzadis ilin. En la urbo mem estas pli bone ne moviĝi per persona aŭtomobilo, ĉar pluraj stratoj estas uzeblaj nur de piedirantoj.

Ni havis sufiĉe riĉan programon, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis persone akompani miajn gastojn ĉien. Ni tamen kune vizitis la katedralon kun la belega mezepoka skulptaĵo de Benedetto Antelami kaj vidis ankaŭ la marmoran memoraĵon, per kiu la germana asocio de presistoj honoras la famkonatan inventiston de preslitoj kaj gravuriston Johano Bondoni de Parma.

Ni promenadis tra la karakterizaj stratoj de la "nobela" urboparto kaj eniris poste en la kvartalon "Oltretorrente" (Trans la torento), kie vivis kaj vivas homoj malpli riĉaj, sed ja tre muzikemaj. Fakte ĝuste en tiu kvartalo troviĝas la naskiĝdomo de la granda Majstro kaj direktoro de orkestroj Arturo Toscanini (esp.: Arturo Toscanini).

Ni salutis mallonge la verdiĝantan urban parkon kun ĝia lageto kaj la grandan "Pilotta", kiu enhavas plurajn muzeojn, belegan bibliotekon, artgalerion kaj la lignan teatron "Farnese".

La ĵaŭda posttagmezo estis dediĉita al la renkontiĝo kun la gesamideanoj de Parma kaj mi devas agnoski, ke mi miris kiom bone kaj lerte oni babiladis en esperanto. Certe al ni plaĉis kunesti kaj kungustumi la normandajn dolĉaĵojn kiel la "madeleine" aŭ la "teurgoule".

Pri tiuj ĉi aferoj rakontis bone nia amikino Errika, kiam ŝi verkis artikolon por la Gazeto

de Parma, kiun ni jam sendis al vi.

Bertrand bone prelegis pri la preparoj al la vojaĝo mem. Ĉu vere li unuan fojon parolis tute sole en Esperanto? Ni ne sukcesas kredi tion. Konklude, al ni ĉiuj lia parolado tre plaĉis.

La tri gastoj montris grandan disponeblecon partoprenante en la festeto, kiun nia kvartalo Sankta Leonardo organizis por la civitanoj dum la internacia tago de la virinoj. Kvankam la koruso "Renzo Pezzani" proponis nur kantojn en la Parma dialekto, Veronik' kaj Bertrand pacience aŭskultis kaj ne grumblis. Mi taksas tiun ĉi paciencon kiel signon de granda malfermiteco. Dankon, karaj geamikoj!

Poste okazis renkontiĝo kun nia samideano profesoro Ermanno Tarracchini. Lia kunportita libreto "La ĉiutaga vivo kiel historio" de la kuracistino Antonietta Bernardoni donis al ni la eblecon paroli pri niaj profesioj.

Sume: estis kvin tagoj tre intensaj por ni ĉiuj kaj la gesamideanoj de Parma deziras danki al la tri normandaj geamikoj, ĉar ili ja ebligis tre plaĉan renkontiĝon. Ni ĉiuj esperas povi vojaĝi al Normandio por rerenkonti ilin kaj konatiĝi ankaŭ kun la aliaj gesamideanoj de la asocio Herouville-Esperanto.

Luigia Oberrauch

(Parma, Italio)



Alessandra, Luigia, Véronique, Bertrand kaj Christian.

Ni vizitis niajn parmajn amikojn...

Kvin normandaj klubanoj planis vojaĝi al Parma (Italio) por viziti la samideanojn de la esperanto-klubo Giorgio Canuto (esp.: Ĝorĝo Kanuto) de la 7-a ĝis la 11-a de marto 2023. La du kluboj estas delonge ĝemelitaj.

Malbonŝance, neatendita lumbago malebligis, ke Claude kaj Marie-Anne finfine vojaĝu. Ili kontraŭvole do rezignis kaj nur tri klubanoj Christian, Veronik' kaj Bertrand vizitis niajn amikojn.

Christian vojaĝis per sia loĝaŭto. Li foriris Normandion pli frue ol Veronik' kaj Bertand ĉar li decidis profiti la okazon por viziti kelkajn italajn urbojn survoje.

Bertrand kaj Veronik' loĝis ĉe Luigia kiu afable akceptis ilin dum Christian tranoktis en sia loĝdomo, parkita en agrabla loĝdomejo en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj ĉiutage biciklis al la urbocentro.

Post mallonga ripozo, ni rapide eliris en la urbon kaj promenis sencele kun Luigia. Tamen estis jam okazo por frandeme gustumi la italajn glaciaĵojn! Post tiu unua kontakto kun Parmo, ni kune vespermanĝis ĉe Luigia. Ankaŭ ĉeestis ŝia filino Alessandra Madella, la vic-prezidentino de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Malbonŝance, ni ne vidis ŝin longe, ĉar, la sekvantan tagon, ŝi forflugis al Pekino al la tiea universitato, kie ŝi instruas Esperanton.

La sekvantan matenon, ni vizitis la juvelon de la urbo, la Palazzo della Pilotta (esp: Palaco-n de la peloto). En la renesanca komplekso, konstruita fine de la dekseka jarcento, ni vizitis la artajn trezorojn de la Nacia Galerio, la belegan Teatron Farnese, tute faritan el ligno, kaj la imponan palatinan bibliotekon. Ni ankaŭ rapide vizitis la arkeologian muzeon.

Ni salutis ekstere la statuon de Giuseppe Verdi kaj omaĝis la Partizanojn kiujn memorigas monumento fronte de la Palaco, "Bella Ciao" (esp: Belulino ĝis) en la kapo.

Kun la horo de la tagmanĝo, venis tempo por daŭrigi niajn kulturajn malkovrojn... en restoracio. Porkaĵoj, vinoj, fromaĝoj, rizotoj, nudeloj, kukoj, glaciaĵoj... Italio estas Kuklando! Kvankam ni kuraĝe klopodis... neebis gustumi ĉiujn specialaĵojn!

Adiaŭinte Alessandra-n, Luigia revenis posttagmeze al ni kaj ĉiceronis en la urbo. Ŝi prezentis al ni la katedralon, la batisterion, la multajn belajn preĝejojn kaj, aliflanke de la rivero, la belan dukan parkon. Dumvoje, ni iom butikumis kaj aĉetis botelon de la fama parma violparfumo.

Ĵaŭdo matene estis libertempo. Christian reiris en la urbocentron por viziti plu la batisterion kaj muzeon dum Veronik' kaj Bertrand elektis viziton de la Abbazia di Valserena

(esp: Kartuzio de Val Serena) de kiu inspiriĝis Stendhal por sia romano La Chartreuse de Parme.

La tiutaga posttagmezo estis la kulminmomento de nia vizito. Ni renkontiĝis kun deko da membroj de la parma esperanto-klubo. Ni diskutis pri ilia onta vizito al Hérouville-Saint-Clair kiu okazos venontan printempon kaj, amike babilante, kundividis temanĝon konsistantan el normandaj kaj italaj frandaĵoj. Vera konkurso: *ĉu ĉampano, ĉu proseo; ĉu teurgoule, ĉu busilân...* Tamen, ni proponas daŭrigi la konkurson kiam niaj amikoj vizitos nin... ni ankoraŭ havas kelkajn argumentojn por konvinki!

La sekvanta tago estis jam la lasta. Veronik' kaj Bertrand ĉeestis spektaklon pri la evoluado de la rajtoj de la virinoj. Tie oni kantis Bella Ciao sed, malbonŝance, ni ne parolas la italan kaj multajn diraĵojn ni ne tute bone komprenis. Reveninte hejmen, ni renkontiĝis kun Ermanno Tarrachini, esperantista pedagogo.

Li estis membro de la parma klubo sed nuntempe ne plu loĝas en Parmo; tamen li planas partopreni la vojaĝon al ni venontan printempon.

Jam estis tempo por reiri. Kion ni ĉiuj memoros pri tiu vojaĝo? Ni kompreneble memoros la bonajn italajn manĝaĵojn, la parmajn artajn ĉefverkojn vizitindajn sed precipe, ni memoros niajn novajn amikojn kiujn ni jam ĝojas revidi. Denove tra Esperantujo kaj per Esperanto enlarĝiĝas nia mondo. Dankon Luigia! Kaj... ĝis baldaŭ!

**Bertrand et Véronique Verstraete
Christian Marlier-Ruquier (14)**



Ĵlastan monaton kun Christian R, Véronique kaj Bertrand ni antaŭvidis vojaĝon al Parmo por rendevuo kun Luiga kaj geesperantistoj.

Kun Marie-Anne ni eĉ aldonis restadon en Florenco dum unu semajno.

Ve!!! Tio fiaskis, ĉar elirintaj mi suferis pro grava lumbago (do ni rezignis).

Kompreneble, ni profunde bedaŭris, sed ni laste subskribis UKon en Torino, fine de julio, kie ni povus renkonti samideanojn el la tuta mondo.

Sendube Italio malfermos siajn pordojn por ni .

Claude Ferrand (14)

L'écrivain Mikaël Bronstein en visite à Hérouville

Hérouville-Saint-Clair — Les membres du club Espéranto à Hérouville accueillent un ami de longue date. L'écrivain, poète, musicien et chanteur russe, né en Ukraine, rappelle la force de l'amitié.

Portrait

Mikaël Bronstein réside à Tikhvine, ville de 70 000 habitants située à 200 km à l'est de Saint-Petersbourg, dans l'oblast de Leningrad en Russie. Il est bien connu aussi de l'association Amitié Tikhvine Hérouville, créée il y a plus de trente ans et qui a participé à la coopération entre les deux villes. Mardi, l'association Espéranto organisait une soirée discussion avec Mikaël Bronstein, suivie d'un dîner. Rencontre au milieu d'un séjour d'une semaine, au cours duquel il a souhaité visiter Honfleur, Caen, et rencontrer particulièrement certains amis.

L'Espéranto : amitié et voyage

Mikaelo, comme l'appellent les plus intimes du club, porte un t-shirt vert sur lequel est inscrit : *Keep Calm and learn Esperanto*. Inutile de préciser son degré d'engagement pour cette langue dont la pratique sous-tend l'amitié et le voyage.

L'espéranto, c'est une langue construite internationale, utilisée comme langue par des personnes provenant d'au moins 120 pays à travers le monde. « Mon premier voyage à Hérouville date de 1991, j'y suis venu au moins dix fois. Cette longue histoire me permet de me présenter comme l'un de vos parents. Je connais déjà plus de la moitié du groupe et certains ont séjourné dans ma maison. En 1994, nous avions peu de nourriture, il faisait froid, mais nous avions de la vodka, » se souvient malicieusement Mikaël. Puis il poursuit : « Les circonstances ne nous permettent pas des visites réciproques, mais les amis de Tikhvine vous saluent. Les moments difficiles ont toujours une fin. J'espère que l'on se rencontrera à nouveau, car de très forts liens existent entre nos deux clubs et les membres du Jumelage. »



Accueilli par le groupe des espérantistes hérouvillais, au centre, Mikaël Bronstein, portant un t-shirt vert. (PHOTO: OUEST-FRANCE)

L'hôte prolonge en présentant son parcours professionnel et sa vie qu'il consacre de plus en plus à l'écriture.

Né en 1949 en Ukraine, le jeune homme de 18 ans part étudier en Russie. Diplômé en électricité et en journalisme, il n'écrit dans un journal de jeunesse que pour s'assurer un revenu pendant ses études. L'ingénieur en électricité travaille à Vorkuta, dans une mine de charbon au-delà du cercle polaire et revient à Tikhvine pour y diriger des entreprises. Il a participé à l'écriture de 87 livres dont 27 sont des œuvres originales en espéranto.

Après huit recueils de poèmes et quatre autres romans, il publie le dernier : *Simeono*. L'écrivain et poète a reçu les lauriers de l'Académie d'Espéranto pour un autre roman *Les étoiles transportent mes rêves*. Musicien et chanteur, il a aussi écrit près de 300 chants dont certains sont enregistrés sur CD.

Contact. Association Espéranto : Gérard Sénécal tél. 06 89 74 26 65

Article et photo

Bertrand Tarleve (14), correspondant Ouest-France Hérouville-Saint-Clair

La 96a SAT- kongreso okazos ĉeeste en Greziljono, Francio

Post tri jaroj da trudita reta kongresado, eblos denove renkontiĝi ĉeeste en unu el la kulturdomoj mastrumataj de francaj esperantistoj : la kastelo Greziljono. La kongreso okazos inter mardo la 18a de julio kaj mardo la 25a de julio 2023. Eblas aliĝi de nun <https://satesperanto.org> kaj klaku « venonta kongreso »

Eblas ricevi pliajn informojn pri la gastig-kondiĉoj en la retejo de la kastelo : <http://gresillon.org/?lang=eo>.

SAT cetere estas societano de la kooperativo, kiu mastrumas la kastelon ekde 1952. En Greziljono jam okazis postkongreso sekve al la 60a SAT-Kongreso okazinta en Bulonjo ĉe Maro en 1987.

Eblos iri bicikle per bicikla vojo nomita « **Vélo francette** », Caen estas for de Beaugé-en-Anjou je 237km, inter ili 94km estas senaŭtaj per tiu bicikla vojo.

Veronik Girard (14)



TURISMA TAGO

la 17 an de Junio 2023

en Dives sur Mer



Suite de la 1ère page : le beffroi

Ses horloges restaurées témoignent du temps, celui qui a passé dans les bruits d'une usine centenaire, le temps présent, le temps qui vient,

dédié à la culture et à l'histoire de la classe ouvrière qui forge, aujourd'hui encore, l'identité de la ville.

« Le Beffroi » occupe une place à part dans la ville et dans le cœur de générations de Divaises et de Divais. Construit autour des années 1891/1892, « le beffroi » marque l'entrée de l'usine métallurgique spécialisée dans la fabrication de produits cuivreux. Elle fut de 1891 à 1986 l'un des centres les plus importants de l'industrie française du cuivre. Elle employait encore au moment de sa fermeture, plus de 1 000 salariés. Deux bâtiments subsistent de cette époque, le « Beffroi », inscrit à ISMH en 2007, et l'ancien bâtiment des bureaux transformé en médiathèque.

Depuis début février 2023, « le beffroi » accueille le Sablier, Centre National de la Marionnette, et l'école de musique intercommunale.


Avec la médiathèque, il constitue un pôle culturel destiné à tous les publics.

La mise en valeur de ce pôle culturel ne s'arrête pas là. Un projet d'aménagement de l'esplanade située devant les deux bâtiments est à l'étude pour en faire un espace public végétalisé, un lieu de vie, de spectacles, de rencontres.

L'esplanade vient de recevoir le nom de Francis Giffard, ouvrier de l'usine, maire de Dives-sur-Mer de 1983 à 2008, artisan de la redynamisation de la ville après la fermeture de l'usine en 1986, avec la construction de Port Guillaume sur le site de l'usine, et l'implantation d'une zone artisanale et industrielle à l'entrée de la ville qui ont compensé la perte d'emploi liée à la fermeture de l'usine.

Danièle Garnier,

Maire-adjointe culture et patrimoine de Dives-sur-Mer



1 Centre de Loisirs les Tilleuls 9046 rte de Lisieux (D45)

2 RDV Médiathèque Face au Beffroi Avenue du Commandant Charcot. Parking

3 La Maison Bleue 13 rue des Frères Bisson parking de la Médiathèque



TURISMA TAGO

la 17an de Junio 2023

L'occasion pour celles et ceux qui n'ont pas pu le faire de régler leur cotisation annuelle (10€)

RDV 9h30

pour un accueil café au centre de loisirs Les Tilleuls

10h

Conférence de Pierre Coftier-en français-
" Dives l'ouvrière"

Pierre nous amènera ensuite pour une boucle de 3 kms à partir de la Médiathèque sur les pas des témoins du passé industriel.

12h30-12h45

Retour au château pour un **Repas partagé** (chacun amène un plat sucré ou salé pour 4 personnes, une boisson et **ses couverts** complets)

Après rangement et ménage,

RDV à 15h15 parking de la Médiathèque pour aller visiter la Maison bleue.

Entrée **7€** à régler avant à Sylvie. Merci de penser à l'appoint.

Après la visite, nous nous quittons.

Conseils de visites libres :

le port, la passerelle pour Cabourg et sa plage, les halles, le village

Guillaume le Conquérant, l'église....ou un pot en terrasse.



Monument à Laika

Bulletin d'Inscription à retourner avant le 1er juin.

par mail : michele.langeois@wanadoo.fr ou par téléphone 06 74 48 96 61 (M.L)



NOM.....Prénom.....

Nombre de personnes ☐

n° de téléphone.....courriel.....@.....

Participera à la journée du 17 juin ☐

à la conférence ☐

à la balade ☐

au repas partagé ☐

à la visite de la Maison Bleue * ☐

* je note que je réglerai 7 € à Sylvie sur place (prévoir de la monnaie ou un chèque)